

La celo kaj domoj de Gastejo Edmond Privat, klariga promenado en la esperanto-kvartalo de KCE en La Chaux-de-Fonds

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI-742/117, 1983 novembro 17, 19

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-117/SRI-117-2-742-1983-11-17-19-Claude-kaj-Andree-Gacond-La-celo-k-domoj-de-Gastejo-Edmond-Privat-klariga-promenado-en-la-esperanto-kvartalo-de-KCE-en-La-Chaux-de-Fonds.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan semajnon ni komencis raporti pri la disvolviĝo de Kultura Centro Esperantista kaj de ties Gastejo Edmond Privat. Por respondi al la deziro de radio-aŭskultantoj ni daŭrigos tiun ĉi prezenton de institucio, kiu posedas sep domojn.

A.- Ĉiusemajne estas proponata al la gastoj de la Centro klariga promenado en tiu esperanto-kvartalo, kiu troviĝas borde de la urbo La Chaux-de-Fonds je la alteco de preskaŭ mil cent metroj super la marnivelo.

Cl.- La gastoj renkontiĝas antaŭ la unue aĉetita domo, kiu ricevis la nomon "Ernest Naville", honore al granda pioniro de esperanto, kiu multe agis por diskonigi la internacian lingvon en la sciencajn mediojn kaj favore al la enkonduko de tiu ĉi lingvo en la lerneajn programojn. Tiu ĝeneva filozofo ankaŭ pioniris favore al la sistemo de la proporcia reprezentado de la politikaj fortoj okaze de balotaj voĉdonoj. En la domo Ernest Naville troviĝas teretaĝe la libro-servo kaj akceptejo de Kultura Centro Esperantista, du klasejoj kaj tri-ĉambra oficejo. Tiu etaĝo estas la koro aŭ cerbo de la Centro.

A.- La unua etaĝo konsistas el du loĝejoj, kies luantoj ne estas esperantistoj. Kaj je la dua etaĝo loĝas la esperanto-instruisto de la Centro, s-ro Stefano Keller. Karakterizas la sep domojn, kun kiuj ni konatiĝas, la fakto ke la keletaĝo estas facile transformebla por enteni du salonojn, ĉar la domoj estas konstruitaj sur deklivo, kiu faras, ke sude la keletaĝoj donas la impreson esti teretaĝo. Volbaj pordoj alportas multe da lumo en tiujn salonojn. Unu jam ekzistas en la domo Ernest Naville, ĝi ricevis la nomon Klara Zamenhof, kaj du estas konstruataj en la apuda domo, kiu ricevis la nomon "Pierre Bovet".

Cl.- La neŭŝatelano, Pierre Bovet estas konata, kiel patro de la moderna aktiva pedagogio. En 1922 li prezidis en la palaco de Ligo de Nacioj la unuan internacian konferencon pri la instruado de esperanto kaj poste organizis grandan enketon pri tiu ĉi instruado. Li estis amiko de Andreo Cseh. Estas do en tiu ĉi domo, ke kreiĝas nuntempe klasejo, kiu ricevos la nomon de la fondinto de la Internacia Esperanto-Instituto en Hago, kun kiu Kultura Centro Esperantista estas en kunlaboro por la modernigo de la Cseh-Metodo. La inaŭguro de tiu ĉi Klasejo Andreo Cseh tre verŝajne okazos la venontan someron enkonduke al Cseh-Metoda Seminario, kiun kunlabore organizos la Internacia Esperanto-Instituto kaj Kultura Centro Esperantista.

A.- Apud tiu klasejo Andreo Cseh estas konstruataj komunaj manĝejo kaj kuirejo. La gastoj, kiuj deziros mem kuiru povos lui kuirejon kaj disponos je manĝloko en tiu salono, kiu verŝajne ricevos la nomon de Pierre Ceresole, alia amiko de Pierre Bovet, fondinto de la Internacia Civila Help-Servo (Service Civil International)

Cl.- Granda parto de la konstruo de tiuj salonoj kaj de aliaj laboroj estas efektivigata monaton post monato okaze de la nun famiĝintaj Semajnfinoj de la Bona Volo aŭ ferie okaze de laborrestado, al kiu la Internacia Civila Help-Servo alportas sian kunlaboron. Ĉisomere dum la du unuaj semajnoj de la monato aŭgusto 25 gejunuloj el 14 landoj laboris al la konstruo de ĝardenmuroj lernante samtempe esperanton. Tiu helplaboro, kiun daŭrigas dum la tuta jaro helpantoj, kiuj restadas en la Centro dum pluraj semajnoj, instigas al malavaremo tiujn, kiuj ne povas plu manlabori aŭ kiuj ne havas la tempon tion ĉi fari. Sen tiu helplaboro kaj sen tiuj donacoj la disvolviĝo de la Centro ne estus tiel rapida.

A.- Sed bonvolo kaj malavareco ne sufiĉas. La sep domoj, kiujn aĉetis Gastejo Edmond Privat kostis po cent mil svisajn frankojn, kaj ilia modernigo kostos almenaŭ trifoje tiun ĉi sumon. Gastejo Edmond Privat devis elprunti tiun ĉi gravan kapitalon. Ĝi agis originale per la kreo de ŝparbanko. Al la alpruntantoj ĝi servadas interezadon de 4,5 procentoj, kaj la ricevitan monon ĝi guste investadas por la aĉeto de la domoj kaj por ties transformado al la celotaj gastejo kaj esperanto-altlernejo. La alprunta kapitalo kreskadas je proksimume centmil svisaj frankoj jare.

Cl.- En tiu domo Pierre Bovet ankaŭ troviĝas du loĝejoj kun luantoj. Kaj la tri aliaj konsistas el gastĉambroj. Entute ekzistas jam nun tri unu-litaj, du du-litaj kaj du kvar-litaj ĉambroj.

A.- Inter la du ĵus vizititaj domoj estas nuntempe konstruataj koridoro, necesejoj kaj konstruota foje granda salono. La tuton kovros teraso, kie oni povos ŝak-ludi per grandaj peonoj. Ĉio antaŭeniros laŭ la ritmo de la helplaboro kaj de la alveno de la mondonacoj.

Cl.- En ĉiu domo troviĝos foje tabulo kun la nomoj de la malavaruloj, kiuj donacis almenaŭ mil svisajn frankojn kaj tiuj, kiuj faras donacon de almenaŭ dek mil svisaj frankoj, povas doni nomon al gast-ĉambro. Du ĉambroj jam ricevis la nomojn "Alice" kaj "Maŭro".

A.- Antaŭ tiuj du domoj etendiĝas teraso kaj vasta ĝardeno, kiu estas iom post iom transformata por esti uzata kiel ripozejo, minigolfludejo kaj tendumejo. Ĉio efektiviĝas okaze de la Semajnfinoj de la Bona Volo fare de la junaj esperantistoj de Svislando.

Cl.- Kvin samaj domoj trietaĝaj kaj kvinloĝejoj formas la reston de la esperanto-kvartalo. Tri el ili formas harmonian grupon: ili gastos la infanojn kaj ebligas la renkontiĝon de du aŭ tri klasoj kiuj lernas esperanton. Ankaŭ kreiĝos infanĝardeno, por ke oni povu veni al La Chaux-de-Fonds familie. Dum la gepatroj studos kadre de la Internacia FERIA Altlernejo de Kultura Centro Esperantista, iliaj gefiloj agrable ferios kadre de gejunulaj kaj infanaj aranĝoj. Tion ĉi celas Gastejo Edmond Privat. Pro tio du domoj konsistos el meblitaj loĝejoj lueblaj fare de tiuj esperanto-familioj.

A.- Tiuj sep domoj estas dissemataj en arboplena kvartalo kun aliaj vilaoj. La tria domo ĵus ricevis la nomon Hector Hodler, kaj oni atendas, ke la alpruntoj aŭ donacoj de la esperantistoj kresku, por bapti la kvaran domon. Tiom longe, kiam bankaj hipotekaj alpruntoj kovras la necesan investadon, la koncernaj domoj restas sennomaj.

Cl.- Ŝparu do monon malfermante ŝparkonton ĉe Gastejo Edmond Privat de Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds, kaj via iompostioma riĉiĝo kontribuos samtempe al la finakiro de la kvara domo, por ke ĝi povu ricevi la nomon tre verŝajne de Cezaro Rossetti, la aŭtoro de la romano "Kredu min Sinjorino!"

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond raportis pri la celo kaj domoj de Gastejo Edmond Privat en la urbo La Chaux-de-Fonds. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), februaro 2013*